


f. M. Ozana Krajačić

LA DRINAJ MARTIRINOJ



vivo kaj martireco

Titolo de la originalo: DRINSKE MUĈENICE: život i muĉeništvo

S. M. Ozana Krajaĉić

Esperantigis: Zora Heide

Lektoris: Lucija Borĉić

Enpaĝigo kaj grafika aranĝo: Marija Beloŝević

Eldono preparita okaze de la beatigo de la Drinaj martirinoj.

Eldonis:

Kroata esperantista Unuiĝo kaj IKUE sekcio en Kroatio

Kontakto:

Sveti Duh 130, Zagreb

marija@hes-keu.hr

Zagreb, septembro 2011

ANTAŬPAROLO	3
ENKONDUKO	5
BIOGRAFIOJ DE LA FRATULINOJ	6
Fratulino M. Jula Ivaniŝević	6
Fratulino M. Bernardeta Banja	10
Fratulino M. Krizina Bojanc	13
Fratulino M. Antonija Fabjan	16
Fratulino M. Berchmana Leidenix	19
MARIA-DOMO EN PALE	22
PERSISTO MALGRAŬ DANĜEROJ	25
FORKONDUKO DE LA FRATULINOJ	27
ĜISMARTIRA FIDELECO	30
LA MORTO DE LA FRATULINO BERCHMANA	32
EĤO DE SANKTECO KAJ MARTIRECO	34
MESAĜO KIU LUMBRILAS	36
PRI LA AŬTORINO	38
ENHAVO	39

PRI LA AŬTORINO

Fratulino M. Ozana Krajačić naskiĝis en 1964-an en Sv. Martin na Muri, kie ŝi finis la elementan lernejon. En la Kongregacio de la Filinoj de la Dia amo ŝi daŭrigas la lernadon, en 1985-a ŝi prezentis la provizorajn votojn kaj ŝi agas kiel katekistino. En la jaro 1994 ŝi foriris al Romo por la postdiploma studado ĉe la Papa teologia instituto "Teresianum" ŝi doktoriĝis pri la spirita aktivado. Reveninte al Kroatio, ŝi dediĉis sin al la monaĥa edukado kaj ŝi gvidas la spiritajn prosperojn kaj radio-elsendojn.

Kiel vicpostulato de la procedo pri kanonizo de la Drinaj martirinoj ŝi redaktas la informan bultenon "La Drinaj martirinoj" kaj en 2008-a sub la gvidado de la patro Hieronim Fokcinski (SJ) ŝi verkis "Pozicion-n" pri ilia martireco.

ANTAŬPAROLO

Antaŭ ni troviĝas mallonga prezento pri la vivo kaj martireco de la Drinaj martirinoj. Ĉi tiu libreto estas siaspeca memorigilo pri tio, kion malforta homo povas fari, elteni kaj kontribui, se li estas gvidata de la Dia graco kaj subtenata de la ĉiutaga renovigo de la fideleco al tiu kiu nin 1a unua amis. (komp. 1 Joh 4,10).

La celo de ĉi tiu libreto ne estas detale priskribi la aŭtentan vivon kaj morton de la kvin fratulinoj el Pale, ĉar tio estis farita en aliaj lokoj, precipe en 1a libro de la fratulino M. Slavica Buljan "Sankta voto sange konfirmita" kaj ankaŭ en la libro de la atestanto, la sacerdoto Ante Baković "La Drinaj martirinoj." Ĉi tiuj paĝoj prezentas la bazajn instigojn al inspiro ĉe 1a procedo de nia formiĝo survoje - al sankteco.

La homo estas vojaĝanto sur la tero. Li vojaĝas sekure, nur se li konas la celon de la vojaĝo kaj se li sekvas la signojn. Sanktuloj estas kvazaŭ signoj de nia vivovojo montrantaj kiel vojaĝi kaj kion kunporti al la vojaĝo. Pro tio, dum ni vojaĝas - kaj premitaj de la nuna tempo kiu suferas pro manko da tempo – ĉi tiu poŝeldono estu memorigilo por trovi la necesan orientiĝon kaj spiritan refreŝiĝon.

Ni lasu la atestantojn paroli. Ilia vorto havas apartan forton, ĉar ĝi devenas el la spertoj de la renkontiĝoj. Tio estas tiuj kiujn la fratulinojn persone konis kaj renkontadis dum la ĉiutaga vivo aŭ ili almenaŭ parte estis kunagantoj ĉe ilia Kalvaria vojo. Konvikintaj pri ilia fideleco, kiu ne cedis eĉ antaŭ 1a mortminaco, ili rekonis ilin kiel signojn lumantajn, kuraĝigantaj ĉiun kiu - dum sia vivovojo - batalas kontraŭ mallumo, malvarmo kaj tempestoj.

La deklaroj de la atestantoj kaj aliaj indikoj estis preni el "Pozicioj" (2008), kaj poste transdonitaj por esplorado al 1a Kongregacio pri la sanktulaj kaŭzoj en Romo. Surbaze de tiu dokumento, nepre necesa ĉe 1a procedo por proklamado de beateco aŭ sankteco de novaj poraltaraj kandidatoj, estis proklamita la fina decido pri la martireco de la kvin fratulinoj el Pale.

f. M. Ozana Krajačić, FDC

kuraĝigas ilin konstrui sian vivon surbaze de la valoroj kiuj neniam malaktualiĝas nek ŝaltiĝas, kiuj - ĉar ili estas eternaj - povas doni veran sencon al ilia ekzisto kaj enigi ĝojon kaj sekurecon en ilin ĉiutagaĵon.

La sakrala vivo kaj la martira morto de la fratulinoj Julia, Berchmana, Krizin, Antonija kaj Bernardeta mesaĝas al ĉiuj ke ekzistas valoroj por kiuj indas ĉion oferi por konservi la amon kaj havi bonstatan vivon (komparu Joh 10,10).

MESAĜO KIU LUMBRILAS

Ekde la momento kiam la cirkonstancoj tion permesis, en Pale kaj en Gorajde ĉe la rivero Drina alvenadis grupoj de la Filinoj de la Dia amo kune kun la kredantoj el diversaj regionoj. Dum silento ili atente aŭskultas la mesaĝon kiu invitas esti sekvata.

Tiuj lokoj parolas pli intense ol la vortoj. Ili gardas la memoron pri la sankteco kiu silente kaj senbrue efektivigadis dum la ĉiutaga vivo. Ili gardas la memoron pri la vivo donacita al la Dio kaj al la homo komplete kaj sen spekulacio. La memoron pri la fideleco eĉ ĉe bagateloj kiuj, per persista laboro maturiĝis kaj la fidelecon rezultigis grandkvante.

Pri la fideleco ĉe grandaj aferoj - dum grandaj tentoj kaj malbonaj cirkonstancoj - per aparta maniero montras la rivero Drina. Tie la fratulinoj proprasange konfirmis tion kion en la tago de ilia votofero ili eldiris pervorte kaj ĝin dum la vivo ĉiutage ripetadis. Tie estis eldirita ilia lasta "Jen mi!"

Ilia vivo kaj ilia martira morto ekde 1941 kaj ĝis hodiaŭ inspiris multajn kiuj en ili rekonis la memorindajn kaj sekvindajn idealojn, indaj por sekvi ilin.

Eĉ hodiaŭ la Drinaj martirinoj brilsekvas per siaj sinteno, sindonemo kaj mesaĝo. Ili estas donaco al la Eklezio - kiel idealoj kiuj instigas kaj altiras. Ili estas konstanta defio al tiuj kies vivo estas konsekrita, kion konfirmas la letero de la fratulinoj el la Karmelita monaĥinejo de la Eta Tereza el Kroŝtar Ivaniĉ: "Ni vivas en la tempo kiu pretas sufoki la valorojn de la spirito kaj en la animoj de la konsekrataj personoj sufoki fidelecon al la idealoj. La Sinjoro metas sur la kandeligon kvin mirindajn idealojn - la Drinajn martirinojn - por ke ili estu nia konstanta defio kaj instigo travivadi fidele nian konsekron al la Sinjoro de tago al tago, per simplaj aferoj, por ke ankaŭ dum pli malfacilaj tentoj simile al ili ni povu per nia vivo esprimi nian *fiat*."

Tio estas ankaŭ instigo al niaj familioj pri persista fideleco koncerne nian vivodispozicion kaj rektan vivĉeeston per sinofero por la aliaj en ĉiuj cirkonstancoj eĉ per preteco suferi.

La Drinaj martirinoj estas provoko ankaŭ por nia junularo. Ili

ENKONDUKO

Estu benataj ĉar oni vin - pro mi - ofendas kaj persekutas kaj la tutan malbonon arigas kontraŭ vi! Ĝoju kaj jubilu: granda rekompenco atendas vin en la ĉielo! (Mat 5, 11-12)

Ĉi tiuj vortoj eldiritaj sur la monto de beateco estas konvena enkonduko al la sankteco de la vivo kaj al la martira morto de la kvin fratulinoj el la Kongregacio de 1a Filinoj de la Dia amo, konataj ankaŭ kiel la Drinaj martirinoj. La fratulinoj: M. Jula Ivaniĉ eviæ, M. Berchmana Leidenix, M. Krizina Bojanc, M. Antonija Faabjan kaj M. Bernadeta Banja estis mortigitaj en decembro 1941 pro malamo kontraŭ 1a katolika eklezio kaj iliaj monaĥaj votoj.

Ilia martireco ne estas aparta kaj izolita kazo, sed ĝi estas parto de la suferado kaj martireco de miloj da senkulpaj viktimoj el tiu periodo sur 1a teritorioj de Bosnio kaj Hercegovino, Kroatio kaj en la tuta mondo. Ĝi estas frukto de la ideologioj kies agado baziĝis sur la principoj de ekstermado de la aliaj por efektivigo de 1a propraj celoj. Aparta celobjekto estis pastroj, monaĥoj kaj la ekleziaj konstruaĵoj.

En tia klimato de 1a sendubaj kontraŭreligiaj intencoj, la martirecon suferas la tuta monaĥa kolektivo kies membrinoj devenas el diversaj landoj: du estas kroatinaj (unu devenas el Hungario), du el Slovenio kaj unu el Aŭstrio.

La fratulinoj dum la militcirkonstancoj kaj persekuto, malsato kaj malvarmo. akuzoj kaj mortminacoj restis fidelaj al Kristo kaj al siaj votoj - ĝis 1a verŝado de la propra sango. Pro tio ĉe ili oni povas prave apliki la eldiron de la apostolo Paŭlo "Kiu nin disigos de la amo de Kristo? Malbono? Angoro? Persekuto? Malsato? Nudeco? Pereo? Glavo? Tion ĉion ni venkas per tiu kiu nin ekamis (Rom 8, 35-37)."

Por diskonigo de la sankteco kaj martireco de ĉi tiuj servantinoj Diaj, en decembro 1999 en Sarajevo komenciĝis procedo por proklami ilin beataj. Post la sukcesa fino de la procedo je la dioceza (2003) kaj la Roma (2010) niveloj, la 14-an de januaro 2011 la papo Benedikto XVI. subskribis la Dekreton pri ilia martireco, per kio li konfirmis ilian beatigon.

BIOGRAFIOJ DE LA FRATULINOJ

Fratulino M. Jula Ivanišević



Kata f. Jula Ivanišević naskiĝis la 25-an de novembro 1893 en la vilaĝo Godinjak apud Nova Gradiška, de la gepatroj Nikola kaj Tera, naskita Ŝimunoviĉ. La sekvan tagon, la 26-an de novembro, ŝi estis baptita en la paroĥeja preĝejo de sta Antonio en Staro Petrovo Selo. En la familio Ivanišević naskiĝis dekunu infanoj, el kiuj kvin mortis frue. Kata kreskis kaj maturiĝis en absoluta kristana medio, ĉe la komunaj familiaj preĝoj kaj regula partopreno ĉe la mesoj dimanĉe kaj festotage, kaj ankaŭ ofte dum la aliaj tagoj.

La elementan lernejon ŝi vizitas en la naskiĝloko atingante bonajn rezultojn, sed post la kvara klaso ŝi devas ĉesigi la lernadon pro malriĉeco, kiel estis notite en la dokumentoj. Kaj tiel en la aĝo de dekunu jaroj ŝi restas hejme por helpi al la gepatroj pri ĉio kio necesis. Jam en tiu aĝo la familianoj rimarkis ke ŝi estas unika kaj malsama ol la aliaj infanoj. Terezija, ŝia pli aĝa fratino, deklaris ke el ŝi elradiis nur bono kaj ke al ĉiuj ŝi estis ekzemplo pri obeemo al la gepatroj.

Ŝi montradis grandan intereson pri la biografioj de sanktuloj pri kio ŝi legis dum la libera tempo aŭ dum ŝi gardis la paŝtantan gregon. Tio kion ŝi tralegis, ŝi rakontis al infanoj kaj samaĝuloj kiuj volonte kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi.

Ankoraŭ iu detalo el tiu periodo malkovras al ni la fratulinon Jula kiel personon kiu estis preta por sinofero, fastado kaj rezigno. Nome, jam en la aĝo de dek jaroj ŝi ne plu manĝas viandon. La intencoj por tiu fastado restas al ni nekonataj. La fratulino Ljiljana Abianac, ŝia nevino, informis: "Dezirante sekvi la sanktulojn pri kiuj ŝi legis, el la nutraĵo kiun la gepatroj preparadis por ŝi dum ŝi paŝtis la ŝafojn, la lardon ŝi donacis al la aliaj infanoj, kaj ŝi manĝis nur la panon. La viandon ŝi tute ne volis

La fino de la milito alportis novan tre malfacilan atmosferon, la homoj pro tio retiriĝis en sin mem, timante paroli pri la viktimoj kaj la malaperintoj. Pri tio la pastro Lutter skribas: "Silento falis sur ĉiujn. Tamen, kiam iu troviĝis en malfacilaĵoj aŭ en similaj situacioj inter la virina mondo, la homoj indikis al la Drinaj martirinoj kiel ekzemplon kaj ateston pri ilia kredo kaj pri la religia konvinkiteco. Kiel estas al mi konate, ĉiuj samopiniis ke ili estas nenio alia ol martirinoj por sia religio." Poste li daŭrigis priskribi la ĝeneralajn konvinkojn de la katolikoj en Sarajevo pri la morto de la fratulinoj: "... malamo al sankteco, al la Eklezio kaj al la monaĥinaj votoj. Ni rigardis ilin kiel verajn ekzemplojn pri fideleco al la Dio kaj al la donitaj votoj unuflanke, kaj aliflanke, pri la terura malamo kontraŭ ĉio kio estas katolika kaj sankta. Tute ne temis pri iu politiko aŭ kroatismo, sed simple pri malamo kontraŭ la sankteco de la monaĥina vivo."

Komparante ilin kun la unuaj kristanaj martiroj li skribas: "Ĉion kovris silento el kiu eruptis la figuroj de la sanktaj virgulinaj kaj martirinaj kiel dum la unua kristana periodo." Kaj li konkludas: "Ili restis fidelaj al siaj votoj ĉar ili estis kompletaj kristaninoj kaj kompletaj monaĥinoj de la unua kristana senco prefere morti ol memvole peki. Laŭ mi ili estis absolute absorbitaj de Kristo, ilia Fianĉo, kiun ili amis per sia tuta estaĵo kaj pro tio ili sin oferis por supernaturaj valoroj. Por mi ili fariĝis heroinoj de la donitaj votoj kaj de siaj votoj, de la vere sankta pureco."

Ankaŭ en Pale oni parolis pri tiu okazintaĵo. Zvonimir Stilinoviĉ, naskita en Pale, atestas pri la opinio de la katolikoj kaj deklaras: "Ni homoj, kiuj per estimo parolis pri ili, opinias ke ili meritas la homan kaj la Dian agnoskon pro la perforto farita al ili. Ni konsideras ilin martirinoj" (...) Ni ne vidas alian kaŭzon krom ke ili estis katolikinoj."

La informo reeĥis ankaŭ en Godinjak, la naskiĝloko de la fratulino Jula. ŝia pranevino Kata Pospišil, naskita Ivanišević rakontas: "La sciigo pri la morto de la fratulino Jula atingis nin revene de la dimanĉa diservo antaŭ Kristnasko. Estis al ni tre penige aŭdi ke ŝi mortis tiamaniere. En tiu momento de malĝojo, Jula, la fratino de la fratulino Jula ekkantis la kanton 'Laŭdata estu la Dio' por danki per tio al la Dio pro la ofero de ŝia vivo." Ŝi memoras ankaŭ ke ŝia patro parolis: "Vi vidis, Kaja, ke ili estos kanonizitaj kiel sanktulinoj."

EĤO DE SANKTECO KAJ MARTIRECO

La sciigo pri la morto de la fratulinoj rapide disaŭdiĝis en Sarajevo kaj en ĝis ĉirkaŭaĵo. Kvankam estis milittempo, la homoj pri tio parolis kaj preĝis pri la protekto de la Drinaj martirinoj, kiel ili mem nomis ilin. Ni apartigas nur kelkajn atestojn.

La pastro Ŝpiro Vukoviĉ memoras ke lia estimo pri ili komenciĝis somere 1942 kiam li, kiel seminariano en Ĝakovo, estis travojaĝanta Bosnion. Pro la detruitaj pontoj, li estis devigita resti kun siaj amikoj kelkajn tagojn en Sarajevo. Pri tio li skribas al la provinca estararo de la Filinoj de la Dia amo en 1986: "Kompreneble, pri kio paroli se ne pri la milita situacio. Min interesas ĉio pri la Drinaj martirinoj. Tiam en Sarajevo la 7-an de julio komenciĝis mia pia admiro pri ilia heroa agado kaj preteco oferi la propran vivon por savi sian virgulinan honoron."

Li konsideras ke ilia ofero estas donaco al la tuta katolika Eklezio, pro kio li sin sincere engaĝas por akceli la renomon pri ilia sanktigo. Kiel homo kiu jam delonge petas protekton kaj ricevas multajn favorojn, li estas konvinkita ke ne necesas timi pro io ajn "se tiel facile troveblas perloj de la kredo martirece eterne brilantaj." Por instigi la kredantojn al pli granda estimado de la sanktuloj kaj martiroj el niaj regionoj, kaj ne nur el la aliaj landoj - li mencias kiel ekzemplon la sanktan Marija Goretti, martirino de la sankta pureco - li engaĝiĝis por mendi pentraĵon pri la Drinaj martirinoj kiu poste ekde la jaro 1986 estas ekspoziciita en la sakristio de la preĝejo de Dipatrino de Dobriĉ en Split. La pentraĵon pentris la fratulino Paŭlina Semenĉiĉ el la Kongregacio de la Servantinoj de bonfaro.

La pastro Ante Lutter en sia letero el 1991 kaj en la peticio por beatigo, mencias valorajn indikojn pri la disvastigo de la famo por ilia sanktigo ekde la komenco. Tiam li estis seminariano en Sarajevo. Li rakontas pri la granda reeĥo de la okazintaĵo inter la popolo: "La evento pri la morto de la fratulinoj ege reeĥis en ĉiuj popoltavoloj en Sarajevo, kaj precipe inter ja sarajevaj katolikoj (...). Oni tuj parolis: tio estas martirinoj de sia profesio kaj de siaj votoj. Kiel dekkvar jara knabo mi povas diri, ke la konvinko estis ĝenerala, tio estas martirinoj." Li memoras la deklaron de la pastro Ante Weiss, vikario en la katedrala paroĥejo en Sarajevo, kiu ne tiom mencias la detalojn pri la okazintaĵo, sed kiu konvinke parolis: "Tio estas martirinoj de la sankta pureco kaj de siaj sanktaj votoj."

manĝi antaŭ ol ŝi venis en la monaĥinejon."

Dum la junaĝo ŝi estis rimarkita kiel tipe modesta junulino, natura per la konduto kaj simpla koncerne la vestadon. ŝin pli allogis silento kaj preĝoj ol danco kaj la ekstera amuzo. Kun la amikinoj ŝi ofte vizitis la preĝejon en Zapolje kaj en Staro Petrovo Selo, kie ŝi volonte gvidis la publikajn preĝojn. Profunde en sia koro ŝi sentis grandan vokon de Dio. Pro tio ŝi parolis ke ŝi ne emas edziniĝi, ĉar ŝi deziras "servi al Jesuo." Tera Ivaniŝeviĉ, ŝia amikino rakontas: "Bone mi memoras Katan. Ni kune kamaradis dum ni estis junulinoj. ĉiam ŝi estis pia, ekde la junaĝo. (...) Kiam ŝi foriris (al la monaĥinejo), ŝi adiaŭis nin dirante ke ŝi iras servi al Jesuo."

Siajn deziron kaj decidon Kata sciigis al la gepatroj en la aĝo de dekok jaroj. Sed la patrino kontraŭstaris ŝian decidon. La nevino Anka Horvatiĉ informas pri tio: "Mia panjo (rimarko de 1a aŭtorino, la pli aĝa fratino de 1a fratulino Julia) ĉiam rakontis al ni ke la onklino Kata ĉiam deziris iri al la monaĥinejo, sed ŝia patrino tion ne permesis, ĉar ŝi estis ŝia ĉefa he1pantino kaj pro tio ne povis permesi al ŝi foriri. Ŝi diris ke dum ŝi vivas, ŝi ne permesos al ŝi foriri." Dume, Kata preĝis tutkore al la Dio. Kaj tiel por prizorgi la malsanan patrinon, ŝia foriro al la monaĥinejo estis prokrastita du jarojn. Tio estis al ŝi ebligita nur post la morto de la patrino.

Ŝi estis akceptita en la Kongregacion de la Filinoj de la Dia amo en Sarajevo en la jaro 1914. Post kelkaj monatoj de al kutimiĝado kaj lernado de la germana lingvo, ŝi foiras al Vieno kie en la ĉefa Domo de la Kongregacio komenciĝas ŝia monaĥina edukado. Tiam, nome, la Kongregacio ne estis disdividita laŭ la provincoj, pro tio ĝis la jaro 1919, la domoj de la monaĥinaj ordenoj troviĝis en Vieno. Kiel kandidatino kaj postulatinino Kata restis unu jaron en Bretefurt, nemalproksime de Vieno, kaj tiam ŝi fariĝis novicino ricevinte la nomon Maria Julia. La provizorajn sanktajn votojn ŝi prezentis la 16-an de aŭgusto 1916 en 1a monaĥineja preĝejo de la Patrino Mirinda en Vieno, kaj la tutvivajn 1a 29-an de julio 1923 en 1a monaĥineja preĝejo de la Reĝino de la sankta Rozario en Sarajevo. En la saman Kongregacion eniris pli poste ankaŭ ŝia pli juna fratino Mara, tri nevinoj kaj unu pranevino.

Tuj post la votdono fratulino Jula venis el Aŭstrio al Bosnio. En sia monaĥina vivo ŝi agadis en pluraj lokoj kaj plunumis diversajn taskojn, ekde mastrumado kaj la elĉerpigaj laboroj sur la kampoj de la Kongregacio ĝis la laboro en la orfejo (en Zagreb) kaj la ofico de la estrino de la Unuiĝo dum pluraj periodoj. Estante juna ŝi vivis sep jarojn en Breŝke apud Tuzla, sur granda terposedaĵo de la Unuiĝo. La fratulinoj de tiu Unuiĝo memoras ŝin laŭ ŝiaj kvalitoj kaj karakterizaĵoj, kaj precipe laŭ ŝiaj obeemo kaj helpemo.

Pro la difektita sanstato kaj problemoj pri la koro, unu jaron ŝi pasigis en Sarajevo konvaleske. Post tio ŝi denove revenis al siaj ĉiutagaj taskoj, akceptinte ankaŭ novajn funkciojn kiuj estis al ŝi komisiitaj. Ŝia tuta konduto kaj agado manifestis eksterordinaran spiritan forton kiu elradiis el ŝi kaj kiun ŝi transigadis al la aliaj. En "la biografiaj notoj pri la fratulinoj" estis notite pri ŝi: "Ĉio kio mankis en ŝiaj firmeco kaj forto, tion ŝi anstataŭis per siaj zorgemo, trankvilo kaj pacienco." Estis ankaŭ akcentita ŝia granda fido al la Dio per kiu ŝi venkis ĉiujn malfacilajn vivosituationojn.

En la jaro 1932 ŝi estis nomumita estrino de la Kongregacio en Pale, kie ŝi restis ĝis la tago de la forkonduko al la kaptiteco la 11-an de decembro 1941. Dank' al la bono kaj spirita matureco de la fratulino Jula, en la komunumo regis la atmosfero de komuneco, preĝo, oferemo kaj amo.

Pri ŝiaj homaj kaj moralaj kvalitoj estis konservitaj multaj atestoj, precipe de la fratulinoj kiuj ofte venadis al Pale pro konvalesko aŭ pro helpo. La fratulino Imakulata Urban memoras ŝin kiel anĝelan animon, afablan, dinamikan, ĉiam pretan helpi kaj komplezi. Ŝian spiritan profilon oni resumas jene: "Sindonema kaj entuziasmo-plena koncerne sian okupon. Kiel estrino prudenta kaj justa. Al la subuloj ŝi estis vera fratino kaj patrino, ili ŝin amis kaj respektis."

Ankaŭ aliaj fratulinoj rekonas en la fratulino Jula idealan monaĥinon kiu vivas en konstanta komuneco kun la Dio, pro kio ŝi elradias specialan pacon kaj internan harmonion. En la libro "Nekrologo" pri la mortintaj fratulinoj en la Provinco pri la fratulino Jula estis notite: "Ŝi havis grandan fidon al la Dia providenco kaj ŝi neniam timis ke ŝiaj petoj ne estos ignorataj." Konfido estis frukto de ŝia profunda kredo kaj aparta Diotimo al la Sankta Spirito.

dekstra riverbranĉo de Drina). Vesna mencias, ke iun tagon ŝi ricevis nigran robon de la mortigita fratulino el kiu ŝi devis kudri ĉetnikan flagon.

La fratulinojn en Sarajevo atingis diversaj informoj pri la sorto de la plej aĝa fratulino el Pale. Iuj diris ke la korpo de la maljunulino estis enterigita en la arbaro en Sjetlina. Pro tio du fratulinoj el Sarajevo iris dum la frua printempo serĉi la tombon de la fratulino. Pri tio skribas la fratulino Silva Rabiĉ: "La fratulinoj senĝene venis al Sjetlina. Ili iras de domo al domo, ili informiĝas kaj serĉas. La loĝantoj montris al ili unuopajn izolitajn tombojn ekster Sjetlina, pri la tombo de la fratulino neniu scias ion ajn. La fratulino Rolanda kune kun la homoj malfermadis laŭvice ĉiujn malprofundajn tombojn (...) ĉie troviĝas nur putraj viraj aŭ soldataj vestoj! Pri la postrestaĵoj de la fratulino Berchmana ne ekzistas spuroj."

Malgraŭ ĉiuj klopodoj, la tombo ne estis trovita. La fratulino Silva konkludas: "Porĉiam ni perdis ĉiun esperon por iam ajn trovi la spurojn pri la valoraj postrestaĵoj de niaj karaj martirinoj el Pale."



La lernejo en Pale kie instruis fratulino Berchmana

LA MORTO DE LA FRATULINO BERCHMANA

La plej aĝa, 76-jara fratulino Berchmana estis dumvoje disigita de la aliaj fratulinoj kaj retenita en iu domo. Ŝi ne plu renkontis la aliajn fratulinojn. Pro la maljunaĝo, malsano kaj tre malbona vidkapablo ofte dum la marŝado ŝi stumbladis kaj faladis kaj pro la streĉoj, vundoj kaj batoj ŝi tute senfortiĝis kaj kolapsis. Dum parto de la marŝado ili metis ŝin sur sledon, sed eĉ el ĝi ŝi faladis.

Kiel kaptitino ŝi estis lokita ĉe iu familio en Sjetlina. Tie vivis la vidvo Ilija Gelo kun siaj du plenkreskaj filinoj. Unu el ili atestas: "Ŝi dormis en la sama ĉambro en kiu dormis mi kaj mia fratino, ĉar ni havis nur ĉambron kaj kuirejon. La fratulino Berchmana plejparte silentis kaj preĝis, kaj kiam ni interparolis, ŝi eĉ foje ekridetis. Kiam ni iris dormi, ŝi petis nin eliri por ke ŝi sin pretigu por la dormo. Kiam ni alportis al ŝi la nutraĵon, ŝi diris: 'Mi bedaŭras ke mi senigas vin de ĝi.' Ŝi restis ĉe ni dum deko da tagoj."

Post certa tempo venis du ĉetnikoj kaj per sledo ŝin forveturigis. La filino de Ilija Gelo rememoras tiun tagon kaj la rozarion de la fratulino: "La paĉjo diris al ili ke ili lasu ŝin, ke ŝi ne povas marŝi, ŝi estas maljuna. Ili ŝin elkondukis, lokigis sur la sledon (...). Post unu horon ili revenis. Unu el ili havis la rozarion de la fratulino Berchmana ĉirkaŭ la kolo. Mi ekhavis grandan deziron posedi tiun rozarion. Mi petis lin doni ĝin al mi. Li diris ke la fratulino ĝin donacis al li kaj ke li bezonas ĝin."

Ilse Senisch (Koĉoviĉ), la germanino, kaptitino en Sjetlina, vizitadis la fratulinojn ĉiutage. Ŝi memoras ke ŝi estis "gaja kaj plena de fido al Dio!" Kiam ŝi eksciis ke la fratulino estis ironta al Gorajde al aliaj fratulinoj - kiuj tiam jam estis mortigitaj - ŝi alkuris por adiaŭi ŝin: "Ŝi foriris kun miaj plej bonaj deziroj; mi envolvis ŝin per lankovrilo kaj donis al ŝi iom da nutraĵo por la vojaĝo. Mi ne kredas min tro pretenda, se mi diras ke ankaŭ ŝi sentis kordoloron - pro la disiĝo. Ili forveturigis ŝin. La veturigisto, reveninte, diris ke ŝi bone venis al la fratulinoj, kaj ke ŝi estas gaja."

La fratulino Berchmana estis mortigita la 23-an de decembro apud Sjetlina. Laŭ la deklaro de Vesna Petriĉ kaj de la aliaj kaptitinoj, en Sjetlina oni parolis ke ŝi estis mortigita sub la ponto de Praĉa (Praĉa estas la

Oni memoras ŝin kiel virinon plenan da komprenemo kiu per sia simpleco influis ĉiujn kun kiuj ŝi vivis. Ili konsideris ŝin sankta fratulino. Ŝia nevino Anka deklaris: "Kiam mi vizitadis ŝin en Josipovac apud Tuzla, mi ĉiam sentis min feliĉa kvazaŭ apud sanktulino."

El kelkaj konservitaj leteroj elradias la beleco de ŝia animo, vera humileco kaj infaneca sindono al la Virgulino Maria. En iu el tiuj leteroj ŝian nevino la fratulinon Ljiljana, tiam junulinon, ŝi konsilas: "Klopodu per la tuta forto sekvi la plej sanktan Virgulinon, precipe koncerne ŝiajn modestecon kaj humilecon. Humileco estas bazo por ĉiu virto, dum orgojlo estas komenco de ĉiu malbono." Tute konscia pri la propra malforteco se ŝi ne kunagas kun la Dia graco, en la sama letero ŝi daŭrigas: "Ni ĉiuj estas malfortaj kaj mizeraj dum ni vivas en ĉi tiu mondo, tial ni bezonas multe da graco kaj la Dian helpon. Preĝu, preĝu ofte eĉ se mallonge ĉar nur la preĝo nin gardas kontraŭ pereco."

La fratulino Julia suferis la martiradon en la 48-a jaraĝo.



Tereziya f. Bernardeta Banja naskiĝis la 17-an de junio 1912 en Veliki Grĝevac apud Bjelovar. Ŝi estis baptita la sekvan tagon en la paroĥa preĝejo de Sankta Spirito. Ŝia patro Josip kiel juna vidvo enmigris Kroation el Hungario, el Kapoŝvar, sep kilometrojn for de Subotica. Kun sia filo Mirko kaj la patrino li ekloĝis en Veliki Grĝevac. Baldaŭ li denove edziĝis al la junulino Tereza Kovaĉ, kies gepatroj estis ankaŭ hungaraj enmigrintoj.

Josip kaj Tereza havis dektri infanojn, el kiuj ses mortis dum la frua infanaĝo. Tereziya estis dekdua infano. Ŝi estis edukita en modela kristana familio pri kio rakontis ŝia pli aĝa fratino Rozalija, la vidvino Tomaĉ: "Miaj panjo kaj paĉjo estis katolikaj laikoj. Ilia edzeco estis harmonia kaj nin infanojn ili bone edukis. (...) En la domo la patro faris altareton. Antaŭ ĝi ni preĝis, ankaŭ niaj najbaroj venadis al ni kaj preĝis kune kun ni, precipe dum majo. Tiun preĝan etoson paĉjo kaj panjo transigis ankaŭ al ni infanoj." La frato Miŝko mencias ke en la vilaĝo oni kutimis diri "diotima kiel Banja-ano."

Krom pri religio, la gepatroj edukis la infanojn esti laboremaj kaj diligentaj. Rozalija atestas: "La patro estis terkulturisto kaj rimenisto. Panjo estis dommastrino. Ili estis tre diligentaj kaj sian diligentecon ili heredis al ni infanoj." Tiel la preĝo kaj la laboro jam de la frua infanaĝo markis la vivon de la eta Tereziya.

La elementan lernejon ŝi vizitis en Veliki Grĝevac, kaj dum la libera tempo ŝi volonte helpis al la gepatroj pri la hejmaj laboroj. Dum ŝi grdis la kortbirdojn kaj la gregon sur la familia paŝtejo, ŝi ofte kun 1a rozario en la mano serĉis izolitan lokon por tie preĝi kaj legi. Malgraŭ la sopiro pri soleco, ŝi posedis gajan kaj viglan spiriton.

vortojn: 'Jesuo, Maria, Jozefo!' Tiuj vortoj estis plurfoje ripetitaj. Per tiuj vortoj ni konkludis ke oni perfortas la katolikajn virinojn, ne la muzulmaninojn. Tiu kriado daŭris ĉirkaŭ unu horon."

De la fratulinoj oni postulis, rakontas Veronika "ke ili demetu la monaĥinajn vestojn, ke ili eliru el sia ĝistiam vivmaniero kaj ĉesu servi Vatikanon." Post tio ŝi konkludas: "Ni ĉiuj sciis, surbaze de aliaj buĉadoj de katolikoj en tiu regiono, ke la atako kontraŭ la monaĥinoj estis farita pro malamo al la katolika Eklezio."

La soldato Juraj Rupĉiĉ, kiu la saman nokton estis lokita kun la aliaj kaptitoj en la teretaĝo de la sama konstruaĵo, aŭdis kriojn kaj helpvokojn kaj vidis la lastajn fratulinojn falantaj tra la fenestro. Li deklaras: "Oni ne povas rakonti nek diri kio okazis, sed oni simple konkludas ke la ĉetnikoj malinde kaj perforte aliris al la fratulinoj kaj ili, por liberiĝi de ilia perforto, saltis tra la fenestro...."

En la tranĉeo antaŭ la kazerno, estis skribite en "la Kroniko de la fratulinoj", kuŝis iu vundita soldato. Krom ke li vidis la fratulinojn salti tra la fenestro, ĉiu el ili - antaŭ ol esti ĝismorte pikvundita - sin krucoŝignis.

La pastro Anto Bakoviĉ diras en sia deklaro kion la sekvan tagon, la 16-an de decembro, li vidis sur la bordo de Drina: "Matene, kiam mi ellitiĝis, laŭ mia kutimo mi iris al Drina kaj apud la muro ĉe la kazerno mi vidis kvar virinajn kadavrojn. Mi estis certa ke tio estas la monaĥinoj laŭ tio kion la ĉetnikoj rakontis en nia domo. (...) El la kvar virinaj kadavroj kiujn mi vidis tiun matenon apud Drina du estis pli junaj, kaj du mezaĝi, laŭ mia tiama konstato. Ĉiu el ili havis vundon sub la mamoj kaj ankoraŭ dekon da vundoj sur la korpo. Mi nombris tiujn vundojn..."

Lia patrino Jelena entreprenis ĉion por ke la korpoj de la fratulinoj estu entombigitaj en la katolika tombejo, ĉe kio ŝi morte indanĝerigis sin. Ĉio estis vana. La korpoj de la fratulinoj restis sur la bordo de la rivero ĝis la malfrua posttagmezo la 16-an de decembro, kiam laŭ la ordono, ili estis per stango forpuŝitaj en Drinan. Tiel Drina fariĝis ilia fluanta tombo.

ĜISMARTIRA FIDELECO

Dum la junulinoj kaj la fratulino Berchmana estis retenitaj en Sjetlina, al la aliaj fratulinoj, post la longaj kaj turmentaj pridemandadoj, estis ordonite daŭrigi la vojon en Gorajde. Estis dirite al ili ke tie ili flegos la ĉetnikajn vundintojn. En Gorajde ili alvenis vespere la 15-an de decembro kaj estis lokitaj en la duan etaĝon de la kazerno de la reĝo Petar Karaĝorĝeviĉ apud la rivero Drina. Ĉirkaŭ noktomezo la ĉetnikoj atakis ilin per malĉastaj intencoj. La fratulinoj rezolute rifuzis ilin. Ili ne cedis eĉ kontraŭ la mortminaco, sed - laŭ la diro de la pastro Anto Bakoviĉ - ili deklaras: "Prefere morton ol tion kion vi postulas!"

La atakoj kontraŭ la fratulinoj, unuopaj persvadoj, batadoj, minacoj kaj ofendoj pri ĉio kio al la fratulinoj estis sankta daŭris preskaŭ unu horon. Kiam post tio ili komencis perforte forŝiradi iliajn vestojn, la fratulinoj serĉas eliron - tra la fenestro. La fratulino Jula marfermis la fenestron en la dua etaĝo kaj invitis la aliajn ŝin sekvi. Ili vokas Jesuon helpi ilin: "Jesuo, savu nin!" Post la falo, rompita kaj vundita ili provas leviĝi kaj fuĝi, sed ili estis mortigitaj per la tranĉiloj de iliaj atakantoj kaj forpuŝitaj al la bordo de Drina.

La krioj de la fratulinoj klare atingis la domon de Stojan kaj Jelen Bakoviĉ, je ĉirkaŭ 150 metrojn for de la kazerno. Marija Ĉoliĉ, naskiĝe Bakoviĉ, tiam dekdujara knabino, atestas: "... ni aŭdis en nia domo la virinajn kriojn el la ĉetnika kazerno: 'Jesuo, savu nin!' La aliaj kriis: 'Jesuo, Jesuo!', tiujn kriojn mi persone aŭdis kaj ilin mi bone memoras." Ŝia pli juna fratino Veronika, edziĝe Ostoja, rakontas: "Kiam aŭdiĝis la virinaj krioj, la panjo kaj la sinjorino Angelina Genda eliris sur la terason. ĉar la vekkrioj ne ĉesis, ankaŭ ni infanoj eliris. Mi tenis la manojn de la panjo kaj de la sinjorino Genda kaj mi aŭdis la kriojn: 'Jesuo, helpu! Jesuo, indulgu!' Kvankam la panjo ankoraŭ ne sciis ke temas pri la monaĥinoj, ŝi ripetadis laŭte antaŭ ni: 'Jesuo, helpu al ili!'"

La pastro Anto Bakoviĉ, kiu tiam estis dekjara, klare memoras kio okazis dum tiu nokto la 15-an de decembro. En sia deklaro li diras: "Ni infanoj tiun vesperon frue enlitiĝis, sed en la nokto la panjo nin vekis kaj malfermis la supran fenestron rigardanta al la kazerno. Ni aŭdis virinajn kriojn kaj ĝemojn kvazaŭ antaŭ nia domo, kaj tiam ni klare aŭdis la

Dum la junaĝo ŝi malkovris al la gepatroj sian deziron dediĉi sian vivon al la Dio per la monaĥineja vivo. Ŝia fratino Rozalija rakontas: "Ŝi diris ke la Dio ŝin vokas kaj ke ŝi deziras sekvi tiun vojon." Ŝi momeras ke ŝi parolis: "Mi preferas morti ol ne efektiviĝi mian mision." Per la gepatra beno, en la aĝo de deksep jaroj ŝi forlasis sian familion kaj foriris al monaĥinejo.

En junio 1929 ŝi estis akceptita en la Kongregacion de la Filinoj de la Dia amo en Koprivnica, kie ŝi restis kiel kandidatino dum kelkaj monatoj, post kio ŝi estis sendita al Sarajevo en la monaĥinan edukejon. En aŭgusto 1930 ŝi fariĝas novicino kaj ricevas la nomon fratulino Marija Bernadeta. Dum la dua jaro de la novicado la instruistino de la novicinoj estis nomumita fratulino Berchmana Leidenix. La novicinon fratulinon Bernadeta ŝi estis instruanta pri la beleco kaj grandeco de la propra sinofero al la Dio laŭ la sanktaj votoj, klarigante al ŝi la vojon de la evangelia simpleco kaj la Regulojn de la Kongregacio.

La 15-an de aŭgusto 1932 ŝi faras siajn provizorajn votojn kaj la 28-an de aŭgusto 1938 siajn vivovotojn. Du monatojn post la unuaj votoj ŝi foriris al Pale kaj eklaboris en la kuirejo. Tio estis ŝia nura monaĥina translokiĝo.

Jam kiel kandidatino ŝi estis rimarkita kiel obeema, serioza, fidinda kaj tre diligenta. Ŝia instruistino dum ŝia kandidatigo, fratulino Maksimiliana Weisner memoras: "Neniam necesis al ŝi dufoje ripeti la saman aferon. Koncerne obeemon ŝi estis konscia kaj oferpreta." Obeemo ĉe ŝi ne estis afero de la naturo, sed valora kaj obstina laboro pri la propra plibonigo. Pri tio antaŭ ŝia noviciĝo estis notite en la raporto: "Laŭnature ŝi inklinas al fiero, sed ŝi trankvile akceptas ĉiujn rimarkojn ĉar ŝi praktikis venki sin mem."

En la dokumentoj de la fratulinoj estis akcentitaj ŝiaj homaj kaj kristanaj kvalitoj. Ili ŝin vidis kiel ekzemplon de oferemo kaj laboremo. Dum sia servo en la kuirejo ŝi estis evidente pacienca, ŝi preparis la nutraĵon zorgeme kaj per amo. La fratulino Irena Hoĉevar resumas ĉiujn ŝiajn kvalitojn al unu: "Fidela absolute." La aliaj akcentas ke ŝi estis kontenta pri ĉio, neniam ŝi plendis pri io ajn. Fratulino Vitalija Oletić rakontas ke ŝi ofte helpadis ŝin en la kuirejo: "Ŝi estis vera bonega fratulineto. Mi ne memoras ke iam ajn mi vidis ŝin nervema aŭ malpacienca. Ŝi estis ĉiam koncentrita."

Ĉar ŝi estis malstatura, ŝi ofte havis okazojn por ĉiutaga ekzercado pri pacienco, por sinadpto kaj plenumo de la taskoj kiuj estis al ŝi konfiditaj. La fratulino Roza Gavran, ŝia kunnovicino rakontas: "Laŭ la funkcio ŝi estis kuiristino kaj ŝi ofte uzis tabureton por povi kontroli kaj kirli la preparitan manĝon. Tion ŝi faris tre sperte kaj estis agrable ŝin rigardi deflanke. Tiun ŝian malstaturan mankon ŝi heroe akceptis kaj, kiel ŝajnis, ŝi ĝin ĝoje toleris."

La fratulino Valerija Trgovĉeviĉ deklaras ke ŝi estis korpe eta, sed spirite granda. Ŝi konkludas: "Kiam mi kolektas ĉion, kion pri ĉi tiu fratulino ni scias, mi povas mallonge kaj koncize esprimi: korpe kaj spirite formita per la Dia amo por esti sunradio al tiuj kun kiuj, inter kiuj kaj por kiuj ŝi vivis. Ŝi estis la eta koro kaj arterio de tiu monaĥina komunumo en Pale." Ankaŭ la aliaj fratulinoj konfirmas la samon. Ili mencias ŝian nelacigeblon kaj ĝojan servemon ĉe la kuirejaj laboroj, kio en tiu tempo - kiam ĉio estis hejtata per ligno, kaj la akvo estis alportata el la puto - estis ligita al multaj malfacilaĵoj kaj oferoj. La fratulino Beata Tomiĉ diras: "Tio estis sufiĉe laciga, sed oni neniam rimarkis ke por ŝi tio estis malfacila."

La fratulino Bernadeta mortis per la morto de martiro en la aĝo de 29 jaroj.

sorto oni nenion scias. Oni preĝu, estis skribite en la letero, "ke la kara Dio savu ilin de la homa furiozo, donu al ili forton rezisti ĉiun danĝeron animan kaj korpan, persisti per la bono. (...) Ni esperu ke la kara Dio nin helpos kaj niajn fratulinojn gardos de ĉiu malbono." Tiam per firma fido ŝi daŭrigas: "La tento estas granda, sed ankaŭ la Dia helpo estas eĉ pli granda. Por ĉio estu laŭdata kaj glorata la Dio."

La monaĥinejo en Pale estis ĝisfunde forbruligita. La fratulinoj el Sarajevo sur la fajroloko, kie iam estis kapeleto kaj la altaro de la Dipatrino, trovis la fanditan ciborion. Sur ĝi ankoraŭ troviĝis la kovrilo. La fratulino Silva rakontas: "Per timrespekto ni ĝin kisis kaj malfermis. Ni ne plu povis reteni la larmojn. Sur la interna vando de la ciborio klare videblis kvin postsignoj de la forbruligitaj hostioj. Kvin postsignoj! Memoro pri la kvin viktimoj!"

vestoj kaj piedvestoj, suferis severan malvarmon, vadis tra dika tavolo de neĝo, transsaltadis la glaciigintajn vojojn, stumbladis kaj faladis. Vesna Petriĉ mencias siajn memorojn: "La nokto, nigraj figuroj grimpas tra Rakovac (la montobazo de Romanija), sub la piedoj knaras, en la nazo frostiĝas, el la buŝo elvaporiga, estis terura vintro. La fratulino Berchmana stumbladis, mi tretas la stretan vojeton neĝoplenan tuj post ili, kaj la aliaj post mi." Ie duonvoje la elĉerpitan fratulinon Berchmana ili disigis disde la aliaj kaj ŝin forlasis en iu lignokabano.

Parton de noktoj la fratulinoj pasigis en forlasitaj kabanoj aŭ en la domoj de ortodoksuloj, kie oni proponis al ili iom da lakto aŭ mielo. Ili estis lacaj, frostiĝintaj kaj elĉerpitaj.

Krom ĉi tiuj eksteraj survojaj cirkonstancoj kaj la suferado, el la deklaroj de la atestantoj ni ekscias ankaŭ gravajn detalojn pri iliaj interna sinteno kiu manifestiĝis per ilia konduto. Ili ne grumblis, ne malesperis, nek petis indulgon - kvankam, kiel konate, ili bonfaris al ĉiuj.

En iu ortodoksa domo, kie la kaptitoj haltis dum mallonga tempo, la fratulinoj genuiĝis kaj silente preĝis. La hejmanoj rezolute subtenis ilin akcentante la bonon kiun ili faris: la dommastro ripetadis: "Bona Dio, vi savu nin!"

La soldato Juraj Rupĉiĉ, kunkaptito, rememoras ke la fratulinoj interrompadis sian silenton kaj la preĝon nur per la zorgo kaj demandoj kio okazas al la fratulino Berchmana.

Dum momentoj ili aspektis timigitaj, sed eĉ tiam ili ne perdis la senton por la aliaj apud si. Ŝtefica Tomiĉ, naskita Preŝnjak, la kunkaptitino, raportas: "Ni junulinoj ploris. La fratulinoj konsolis nin kaj diris ke ni preĝu kaj ke nenio okazos al ni." Kiam la pastro Meŝke tremis pro malvarmo, la fratulino Krizina surmetis sur lin sian lanan surtuton. Tiun kristanan geston de amo li mencias en sia libro post liberigo kaj la reveno al Slovenio: "... Ŝi estis tiel bona kaj donis al mi sian grandan ŝalon, ke mi ne frostiĝu."

Al la fratulinoj en Sarajevo, la 12-an de decembro antaŭtagmeze, estis anoncite ke la fratulinoj estis forkondikitaj, ke "la domo en Pale ankoraŭ brulas, kaj pri la fratulinoj oni nenion scias." La 15-an de decembro la provincestrino, fratulino Lujza Reif, en sia kristnaska cirkulero invitas ĉiujn arde preĝi por la forkondikitaj fratulinoj pri kies

Fratulino M. Krizina Bojanc

Jozefa f. Krizina Bojanc naskiĝis la 14-an de majo en la vilaĝo Zbure apud Ŝmarjetske Toplice en Slovenio. La saman tagon ŝi estis baptita en la paroĥa preĝejo en Ŝmarjeti. La gepatroj Mihael kaj Marija, naskita Bizjak, havis kvin filinojn kaj unu filon kiu mortis en la aĝo de ses jaroj. Jozefa estis la dua infano en la familio.



La familio vivis kune ĝis la jaro 1891, kiam la patro foriris al Usono serĉante laboron, sed post kelka tempo malaperis ĉiu spuro pri li. La patrino restis sola kun la malfortaj infanoj kaj ŝi komencis okupiĝi pri terkulturado por vivteni ilin. Ŝi estis tre pia kaj ĉerpis la forton el la ĉiutaga meso kaj komunio. Ŝi klopodis eduki siajn infanojn laŭ la sana kristana spirito.

Post la frua morto de la filo, siajn filinojn ŝi lasis al la aparta protekto de la Virgulino Maria, antaŭ kies altaro ŝi ofte preĝis.

Pro la familia situacio Jozefa restis hejme ĝis la aĝo de tridek ses jaroj por helpi al la patrino kaj al la fratinoj. En tiu jam plenkreska aĝo ŝi konatiĝis kun la fratulinoj de la Kongregacio de la Filinoj de la Dia amo kiuj en Slovenio kolektadis helpon por siaj eduklerigaj institucioj en Bosnio kaj Hercegovino. Ŝi eksentis tre fortan internan vokon kaj la deziron sin dediĉi al la Dio kaj al la monaĥineja vivo. Ŝi decidiĝis kaj foriris al la monaĥejo en Sarajevo. Nur kelkajn jarojn poste, ŝin sekvas ankaŭ ŝia pli juna fratino Angela (la monaĥina nomo f. Alfonza).

En la Kongregacio ŝi estis akceptita la 28-an de decembro 1921. Baldaŭ oni rimakis ŝiajn apartajn kvalitojn, kies bazoj devenis jam el la familia hejmo. Precipe ŝin ornamis obeemo, atentemo al la proksimulo kaj la koro por la aliaj. Absorbata de tia orientiĝo al la proksimuloj, kaj la propra sinforgeso, ŝi fariĝis novicino la 27-an de junio 1922 ricevinte la

nomon fratulino Marija Krizina. La unuajn votojn ŝi donis la 28-an de junio 1922 kaj la dumvivajn tri jarojn poste, la 5-an de aŭgusto 1926.

Fratulino Krizina dum du periodoj vivis en Pale kaj en aliaj kolektivoj en Bosnio, precipe en tiuj kiuj per la terkultua laboro materie provizis la lernejojn kaj la internulejojn de la Kongregacio. Ŝi zorgis pri la brutaro, laboris sur la kamparo, en la tolaĵlavejoj kaj ĉe la mastrumlaboroj. La fratulino Ljiljana diras pri ŝi: "Ŝi estis tre silentema, koncentrita kaj pia. Ŝi estis silentema kaj laborema kiel abelo."

La fratulinoj mencias ke laŭ la naturo ŝi estis timema, sed koncerne la laboron tre konscia, fidinda kaj oferpreta. Ŝi havis rafinitan observemon, ĉiam estis helpopreta, komprenema, preta konsoli. Ŝi estis simpla, modesta, netrudigema. La fratulino Blanka Kralj deklaras: "Neniam ŝi ĝenis per siaj problemoj aŭ per nekomprenemo. Mallaŭte en si ŝi preĝis por la beno ĉe la laboro, por siaj superuloj kaj kunfratulinon. Unuvorte, ŝi estis tute Dioplina kaj tiom maturigintan la Dio ŝin prenis al si."

Ŝi estis persono dediĉita al la preĝo, pacienca kaj sindona al la Dia volo. En la preĝo ŝi ĉerpis amon kaj forton por sia ĉiutaga sindonado al la proksimuloj. La fratulino Beata deklaras: "Ŝi estis Dioplina kaj ŝi ĉiam meditis pri la Dio. Tio estis videbla laŭ ŝia sinteno."

Kian signifon por ŝi havis la sankta meso, plej bone parolas iu okazintaĵo en la Pala arbaro kie ŝi ploris pro Kristo. La fratulino Ligorija Murn rakontas: "Jam maljuna, ŝi laboris en la arbaro kaj foje tie mi vidis ŝin plori. Mi demandis ŝin ĉu estas malfacile por ŝi labori, kaj ŝi respondis ke por ŝi ne estas malfacile labori, sed ke estas malfacile ke ĉiutage mankas meso kaj komunio."

Ŝi alproksimiĝis al Jesuo kaj lia Koro per la Virgulino Maria. Post kiam la familia eduko starigis bonajn kaj firmajn fundamentojn, ŝi daŭrigis plu konstruadi. Inter la fratulinon ŝi estis rekonebla laŭ la karakterize flegata sinteno al sankta Maria, laŭ la granda amo kaj pieco al la Virgulino Maria. Al ŝi estis dediĉita ŝia vivo, kaj ankaŭ al la aliaj ŝi rekomendadis preĝi al ŝi per konfido ĉar ŝi estas "bona patrino kaj senduba helpantino".

Ŝia spiriteco estis videbla pere de sincera kaj engaĝita amo al la fratulinon kun kiuj ŝi vivis. Ĉiuj sentis ŝian zorgemon ke neniu estu trom ŝarĝita per laboroj. Ŝi vivis laŭ la evangelia spirito, ne laŭ la korpa spirito

PERSISTO MALGRAŬ DANĜEROJ

En Pale ekde septembro 1941 de tago al tago iĝis ĉiam pli danĝere. La fratulinon, malgraŭ danĝeroj, decidis resti kun la homoj por kuraĝigi kaj subteni ilin. Krom tio, ili sciis ke al ĉiuj ili faras nur bonon kaj pro tio ili ne timis pri sia vivo. Per siaj ĉeesto kaj agado ili konfirmis la amon kiun la Dio montras al ĉiu homo, kiu ajn li estas. Kiam en septembro la pafado iĝis pli intensa kaj pli proksima, en "la Kroniko" de la Sarajeva Kongregacio, pri la fratulinon estis notite ke, malgraŭ ĉio, ili daŭre "trankvile laboras."

La 16-an de oktobro, du monatojn antaŭ la morto, la fratulino Jula skribas al sia fratino Jula Horvatoviĉ pri la militteruraĵoj, pri la ofta malfunkcianta fervoja trafiko, la sola kontakto kun Sarajevo: "Ekestis granda malbono kaj malfacilaĵoj ĉiuflanke. Ĉirkaŭ ni oni detruas, bruligas, ŝtelas kaj rabas kaj la homoj fariĝas sovaĝaj, pli malbonaj ol sovaĝaj bestoj. (...)Ni atendas tion kion la kara Dio pri ni decidis. La danĝero estas granda, sed nun ne eblas iri ien ajn. La kara Dio donu al ni feliĉan kaj belan morton, nenion alian ni bezonas." Tute konscia pri la mortdanĝero, ŝi diras "estus Dia miraklo se ni elirus vivaj el ĉi tiu malbono".

Dum ili preĝas kaj suferas pro la paco en la mondo - kaj precipe en Bosnio - ŝi konfesas ke la homa naturo estas fragila kaj labila kaj ŝi preĝas por si kaj por la fratulinon: "Preĝu por mi ke mi persistu kaj ĉion feliĉe venku ĉar ni ĉiuj estas malfortaj kaj ni timas suferojn kaj malfacilaĵojn."

Dum tiu malfacila tempo ili konfidis al la Dia providenco kaj al la boneco de la najbaroj ortodoksuloj al kiu ili bonfaris, akcentas la fratulino Lujza Reif, la provincestrino. La samon konfirmas la fratulino Jula. Firme fidante tiun kiu scias kio estas la plej bona por ili, ŝi skribas en la menciita letero "Ni troviĝas en la manoj de Dio kaj li plej bone scias kio estas bona por ni. Se por la savo de la animo estas pli bone ke ni vivu, la Dio nin savos el la malamikaj manoj, kaj se ne, li prenos nin al si antaŭ tio."

Pro tiu konvinko kaj konfido la fratulinon decidis resti en Pale. Ili preĝis por la paco kaj por la Eklezio, instigante ankaŭ la aliajn fari la samon. "Multe preĝu al la kara Dio ke li donu pacon al la mondo", la fratulino Jula mesaĝas al siaj parencoj en la letero la 16-an de oktobro. La

Ankaŭ la fratulino Ljiljana konsideras ilin imitindaj fratulinoj kaj pro tio ŝi deklaras: "Iliaj laboro, vivo kaj pieceo por mi estis idealo."

La fratulinoj aparte elstaris per sia amo al la proksimulo, pri kio atestas la loĝantoj de Pale kaj de la ĉirkaŭaj vilaĝoj, kie plejparte vivis ortodoksuloj kaj muzulmanoj. Kiam malsaniĝis la najbara ortodoksulo, "la fratulino Jula alportadis al li teojn kaj lin flegadis", rakontas la fratulino Ljiljana. Kaj ŝi daŭrigas: "Kiam elsur Romanija kaj ĝia ĉirkaŭaĵo la ortodoksaj vilaĝanoj iris al la foiro en Sarajevo, preterpasante ili eniris la monaĥinejon por refreŝiĝi kaj satiĝi."

Zvonimir Stilinoviĉ, naskita en Pale, estante knabo ofte renkontadis la fratulinojn venante al ilia kapeleto en Kalovita Brda, tri kilometrojn for de la vilaĝa centro. Li informas kia opinio pri la fratulinoj plej parte regis inter la katolikoj de tiu regiono: "Ni observis la fratulinojn dum ili laboris aŭ preĝis. Por ni ili estis ekzemplo pri la homa kaj kredanta konduto. (...) La fratulinoj por ni estis nocio pri homeco, boneco, humaneco kaj konformeco." Al li estis konate ke ankaŭ inter la ortodoksa loĝantaro ili estis estimataj: "Laŭ mia tiama informo, la fratulinoj ĉe la lokaj ortodoksuloj, almenaŭ ĉe la plimulto, ĝuis bonfamon. Oni estimis ilian oferecon. Mi ne aŭdis ke iu minacis ilin. La ortodoksuloj kun kiuj ni vivis en la malnova komercokvartalo kondamnis la perfortan forpelon de la fratulinoj."

Kiam en marto 1942, post diversaj sciigoj kaj konjektoj, alvenis la konfirmita sciigo pri la morto de la fratulino, la provinca estrino fratulino Lujza Reif informis pri tio ĉiujn fratulinojn en la Provinco. Ŝi konsideras ilin la plej bonaj fratulinoj kiuj vivis inter ili kaj tio signifas por ŝi la solan konsolon. En la cirkulero estas skribite: "Ne necesas ke mi priskribu al vi niajn malĝojon kaj doloron pro ili. Nia sola konsolo estas ke ili estis, kiel ankaŭ vi ilin konis, niaj plej bonaj fratulinoj, veraj monaĥinoj, diligentaj kaj laboremaj. Ekzistas malmultaj fratulinoj kiuj ne spertis la bonon, afablon kaj la fratinan amon de nia kara fratulino Jula, kaj ankaŭ de la aliaj. Kiu povas anstataŭi ilin, mi ne scias."

kio evidentiĝis el ŝia determiniĝo por tio kio estis pli malfacila, kaj ne por tio kio estis pli facila. La fratulino Vinka Udoviĉiĉ, tiam juniorino, rememoras: "Dum ni plenumis malfacilajn laborojn en la ekonomio la fratulino Krizina ĉiam akceptis pli malfacilan laboron, kaj al mi lasis la pli facilajn laborojn".

En aprilo 1939, laŭ la propra peto, ŝi estis denove translokigita al Pale. Oni ne konas la motivon de tiu ŝia deziro. Estas nur konate ke ŝi jam vivis en Pale (de 1925 ĝis 1927) kaj tiam ŝi estis translokita ĉar la laboro pri la brutaro ne sukcesis al ŝi. Ĉu ankaŭ ĉe tio ĉeestis la motivo "elekti por si la pli malfacilan", ni ne scias, tio restas konata nur al la Dio. Iom da lumo pri tiu ŝia decido donas la atesto de la fratulino Vinka kiu ofte aŭdis ŝin paroli ke ŝi dezirus morti kiel martirino. Eble ĝuste tiu kaŝita deziro estis ŝia konstanta instigo ne ŝpari la propran vivon, sed malegoisme sin malŝpari kaj fordoni, ĉiam elektante tion kio estas pli malfacila kaj pli malfacile atingebla.

La fratulino Krizina mortie per la martira morto en sia 56-a jaraĝo.



Jozefa f. Antonija Fabjan naskiĝis la 23-an de januaro 1907 en la slovena vilaĝo Malo Lipje (ne malproksime de Novo Mesto), kiu apartenis al la paroĥejo Hinje kaj hodiaŭ al la paroĥejo Jujemberk. Ŝi estis la tria el la kvin infanoj de Janez kaj Jozefa, naskita Kralj, kiu akceptis ankaŭ tri pli aĝajn infanojn de Janez post la morto de lia unua edzino.

La patro Janez subite malsaniĝis en la jaro 1911 kaj mortis, do la patrino restis sola kun ok infanoj. Ili havis grandan bienon kaj ŝi luktis por vivteni kaj bone eduki la infanojn. Ŝia fratino Amalija, la vidvino Pruĵan, du jarojn pli juna ol Jozefa rakontas: "Ŝi zorgis ne nur por vivteni nin, sed ankaŭ por nin spirite eduki. En la domo oni ĉiutage preĝis kaj dimanĉe ĉeestis la meson."

De Jozefa, ŝia plej aĝa filino, la patrino esperis plej multon. Kvankam ŝi estis tre talentita kaj kapabla, la familiaj cirkonstancoj permesis al ŝi fini nur kvar klasojn de la elementa lernejo. Tiam la patrino grave malsaniĝis kaj Jozefa ŝin flegis. En la jaro 1918 la familion denove trafis ankoraŭ unu doloro kaj perdo - la morto de la patrino. Tiel la infanoj, ankoraŭ neplenaĝaj, restis sen ambaŭ gepatroj kaj la zorgon pri ili transprenis la parencoj. Tiam Jozefa estis deknunjara. Pri ŝia plu edukado zorgas pia virino, la fratino de la patrino Marija Poznik. Ŝi daŭrigas eduki ŝin en la kristana spirito kaj ŝin firmigi pri la valoroj kiuj estu ŝia vojmontrilo en la vivo.

Iun tagon Jozefa konfidis al la onklino sian intencon dediĉi sin al la Dio kadre de la Kongregacio de la Filinoj de la Dia amo. En aprilo 1929 ŝi foriris el Slovenio al Bosnio kaj en Sarajevo ŝi komencis sian monaĥinejan vivon. Jam kiel novicino ŝi elstaris per obeemo kaj labora konscio. En marto 1930 ŝi noviciĝis ricevante la nomon fratulino Marija Antonija. Ŝia instruistino dum la dua novicjaro kaj dum la tempo por

La atako kontraŭ la monaĥinejo okazis la 11-an de decembro, dum la malfrua posttagmezo, kiam pro la vintra sezono jam komencis malheliĝi. La fratulino Jula ankoraŭ ne estis reveninta el la centro de Pale, kien ŝi iris por aĉeti farunon. La aliaj kvar fratulinoj estis en la domo kun la pastro Meŝke, loĝanta en la subtegmentejo.

Kiam aŭdiĝis la pafado, kriadado kaj brutaj frapadoj sur la pordo de la monaĥinejo, la tri fratulinoj Krizina, Antonija kaj Bernadeta - kuris al la ĉambro de la pastro Meŝke, ili genuiĝis antaŭ li petante absolvon. La fratulino Berchmana, pro sia maljunaĝo kaj malsano, restis en la malsupra ĉambro. En tiu momento grupo da ĉetnikoj perforte eniris en la domon kaj ĉiujn elpelis eksteren, en la neĝon. Tiam en la korto aperis la fratulino Jula kaj - je la granda surprizo de la ĉetnikoj - ŝi aliĝis al siaj fratulinoj.

Laŭ la deklaroj de la atestantoj, tiu heroo ago de la fratulino Jula esprimis la grandecon de ŝia amo al la fratulinoj kaj ŝian pretecon por martiriĝo. Laŭ la sciigo de Frano Miliŝiĉ, la helpanto de la fratulino Jula en "la Kroniko" estis pri tio notite: "Revenante hejmen, aŭdiĝis forta pafado desur la ŝoseo, iom malproksime de nia domo. (...) Kiam ili alvenis al nia korto, subite aŭdiĝis bruego el la flanko de la infandomo kaj la lernejo. Aŭdiĝis ankaŭ la krioj: 'Kaptu ili vivajn, ni ne bezonas la mortajn!' Fakte konsciante ke ŝi frontas al mortdanĝeron, la bona fratulino, estrino, per la vortoj: 'Mi iras al la fratulinoj!' direktiĝis al la domo, dum ŝia akompananto kuris al la vilaĝo, akompanata de kartoĉpafado."

La fratulino Silva Rabiĉ, en siaj memoroj kaj laŭ la pli postaj konstatoj notis jenon: "Fratulino Jula komprenis kio okazas. Kion ajn ŝi havis en la manoj, ŝi ĵetis ĝin en la manojn de la servisto, per la vortoj: 'Franjo, kuru kien ajn vi volas, vin ili mortigus, sed mi devas iri al miaj fratulinoj!' Kaj ŝi kuraĝe eniris la domon." Kelkajn momentojn pli poste ĉiuj kvin fratulinoj kune kun la pastro Meŝke estis forkondikitaj al la direkto de Sjetlina, kaj poste al Gorajde, kaj la monaĥinejo estis prirabita kaj bruligita.

Al la grupo de la kaptitoj la saman vesperon aliĝis kelkaj junulinoj el la najbara infandomo, kiuj pli poste estis liberigitaj. Dum sia kvartaga marŝado tra la romaniaj montoj kaj arbaroj la fratulinoj, sen konvenaj

inicianto de ĉiuj ĉi malbonoj kiuj ilin trafis, ŝi konfirmas, estas la malbona spirito. Pro tio ŝi petas ilin multe preĝi "por la katolika Eklezio ĉar ĉion tion faras la malbona spirito kiu malbonfaras al la mondo kaj delogas la homojn malami kaj buĉi unuj la aliajn."

Matene la 11-an de decembro - la tagon kiam ili estis forkondukitaj - la fratulino Jula esprimas ankoraŭfoje sian ardan preĝon por la paco en la mondo. Al la fratulino Franciska Duŝiĉ en Zagreb ŝi sendas kristnaskan gratulkarton kaj skribas: "La kara novnaskita Savanto donu beatan pacon al ĉi tiu malkvieta lando." Estas signifoplene ke en tiu ŝia lasta, tre mallonga letero plurfoje menciitas la vorto - paco.

Surbaze de ĉi tiuj atestoj oni povas konkludi ke la ĉefa motivo por ilia restado en Pale estas ĝuste la preĝo kaj ofero por la paco, precipe en "la sanganta Bosnio", kiel skribas la fratulino Jula la 11-an de decembro. La lastan fojon ŝi rekomendas en la preĝo sin kaj la fratulinojn, por ke ili povu eĉ en la malbonaj cirkonstancoj - resti persistaj kaj fidelaj ĝis la fino: "Ho, tiu sanganta Bosnio, en ĝi neniam ekzistas paco. Helpu al ni preĝi kaj oferi ke ĉi tiu malbono jam foje ĉesu aŭ ke ni translokiĝu en iun pli bonan vivon kaj ne plu rigardu tioman malbonon ĉirkaŭ ni. Adiaŭ kaj preĝu por ni ĉar la tagoj estas malbonaj."



La Maria-domo en Pale

preparo al la votoj estis fratulino Berchmana, saĝa kaj sperta monaĥino kun kiu ŝi pli poste kune suferos la martiran morton. Inter la elstaraj ecoj de ŝia personeco en la raporto antaŭ ŝia votofero estis notite: "Entuziasmigita por la monaĥina vivo kaj konsekvenca plenumi tion por kio ŝi engaĝis sin." Ŝiaj provizoraj votoj okazis la 19-an de marto 1932, kaj la tutvivaj kvin jarojn pli poste, la 28-an de aŭgusto 1937.

Fratulino Antonija dediĉis sin al la ĝardena laboro, en la tolaĵlavejo kaj sur la kamparo de la Kongregacio kiu prizorgid la eduklerigajn instituciojn de la Kongregacio. Baldaŭ aperis la unuaj sanproblemoj kaj ŝi provizore resaniĝis en Pale kaj denove revenis al siaj taskoj. Du jarojn pli poste, en 1936, ŝi estis operaciita kaj post la resaniĝo ŝi translokiĝis al Pale, kie ŝi restis ĝis la fino de la vivo.

Pri ŝiaj homaj kaj kristanaj kvalitoj estas konservitaj atestoj de la fratulinoj kiuj ŝin konis. La fratulino Ljudevita Torbŝinoviĉ memoras ke ŝi "serioze subiĝis al sia misio" jam dum la komencaj jaroj de la monaĥina vivo. La samon konfirmas ankaŭ la fratulino Vinka kiu havis okazon vivi kun ŝi kaj ŝin pli proksime ekkoni: "Mi ne tuj tre alproksimiĝis al ŝi, ĉar ŝi ŝajnis al mi tro serioza. Sed laborante kaj vivante kune, mi alproksimiĝis al la fratulino kaj konvinkiĝis ke ŝi estis tre bona monaĥino. Kvankam nia laboro estis tro peniga ĉe la somera varmego, ni ĉion faris pro la amo al la Dio." Ŝi ekkonis ŝin kiel pian, konsciencan kaj tre diligentan, kio ŝin ankaŭ instigis al pli konsciencia monaĥina vivo. Por ŝi precipe ŝi estis ekzemplo pri jeno: "Neniam mi aŭdis ŝin paroli kontraŭ la estrino aŭ kontraŭ iu el la fratulinoj."

La fratulinon Antonija ĉiuj konis kiel silenteman, ekvilibran kaj prudentan personon. Ŝi parolis nur kiam tio necesis kaj utilis al la proksimulo aŭ se temis pri la spirita vivo. La fratulinon Valerija impresis ŝia trankvileco kiu estis frukto de ŝia persista agado pri la propra spirita vivo. Pri ŝia prudento ŝi skribis: "Prudento estis karakterizo de ŝia kvinta karaktero. Ŝi plenis de la Dia Spirito." Tiam ŝi mallonge resumas ŝian spiritan profilon: "Ideala fratulino, kiu per sia brila ekzemplo kaj laborplena vivo ĝis sia martira morto ĉiujn altiris fari la samon."

La fratulino Ligorija memoras ŝian vivprincipon, transprenitan ĉe la onklino kiu ŝin edukis. Ŝi rakontas: "Kiam fratulino Antonija estis kun mi en Betanija, ŝi rakontis al mi ke la onklino ĉiam parolis al ŝi: 'Kiu agas al vi malbone, vi reagu al li per bono', kiel estis dirite en Evangelio. Ĉiam ŝi

konduktis laŭe."

En la libro "Nekrologo pri la fratulinoj" estis notite pri ŝi ke super ĉio ŝin ornamis obeemo kaj humileco, kio esprimiĝis en ŝia rilato al la Dio kaj la homoj. Okupiĝo pri la ĝardenlaboro, la laboro en la lavejo kaj la mastrumado gvidis ŝin al tio ke ŝi malkovris la valoron kaj la belecon de la etaj aferoj. Pro tio ŝi ne strebis al io pli alta. Ŝi amis la Dion super ĉio, oferante per la amo ĉion kion ŝi faris dum la tago. Ŝia laboro estis saturita per preĝoj. Ŝi ofte vizitis la kapeleton, memoras la fratulino Anita Vlahoviĉ, kie ŝi preĝis silente kaj koncentrite.

La amo al la Dio reflektiĝis per la amo al la proksimuloj, pri kio en "Nekrologoj pri la fratulinoj" estis skribite: "Neniam necesis ŝin peti pri iu komplezo, ĉar la fratulino mem rimarkis niajn bezonojn kaj ĉiam pretis helpi nin."

La fratulino Antonija estis martire mortigita kvar jarojn post la vivovoto, en la aĝo de 34 jaroj.

tempo al tempo venadis por plugi la kampon. Per dankemo li memoras ilian bonecon kiun li plurfoje spertis: "Al mi ili estis tre bonaj, eĉ la propra patrino ne estus pli bona."

La fratulino Antonina Majnariĉ atestas pri la eksterordinara zorgemo de la fratulino Julia kiu ŝin flegis kiam ŝi malsaniĝis je pulmoj kaj konvaleskis en Pale. Pri ili ĉiuj ŝi diras ke ili estis "orebonaj kaj amoplenaj."

La altruisma agado de la fratulinoj kaj la senpaga helpado al la homoj ĉe diversaj bezonoj estis konata al ĉiuj loĝantoj de tiu regiono, tiel ke la monaĥinejon oni alnomis 'gastejo de malriĉuloj'. Koncerne tion Franjo Miliŝiĉ rakontas: "Ili donadis multon al la malriĉuloj, kaj ankaŭ pruntadis al ili diversajn ekde petrolo ĝis salo. Koncerne la helpadon ili ne faris diferencon inter homoj. Ili helpadis al la ortodoksuloj same kiel al la niaj. Neniam de iu ajn mi aŭdis pri ili ion malbonan."

La Sarajeva "Katolika semajngazeto" sporade publikigis mallongajn artikolojn pri la fratulinoj el Pale, la konataj bonfarantinoj. En la jaro 1942 oni skribis: "Al siaj najbaroj kiuj estis ekskluzive ortodoksuloj, la fratulinoj estis nur amikoj kaj bonfarantoj. Ĉiuj fratulinoj senescepte estis nur modelaj monaĥinoj, sed ankaŭ diligentaj abeletoj de sia eta ekonomiejo; ili estis bonaj, ĉastaj, simplaj kaj ĝentilaj."

Ĉiuj atestoj akcentas ke la fratulinoj helpadis al ĉiuj homoj, ne konsiderante kiu estas kiu aŭ al kiu nacieco aŭ religio iu apartenas. Dum la Dua mondmilito tiaj okazaĵoj plioftiĝis per la apero de multnombraj fuĝintoj kaj forpelitoj, precipe en tiu parto de Bosnio.

En aprilo 1941 en la monaĥinejo en Pale dum unu semajno restadis ankaŭ la registaro de la Reĝlando Jugoslavio kaj generalo Simoviĉ fuĝinta el Beograd. En la domo de la fratulinoj ili okazigis sian lastan kunsidon dankante al la fratulinoj pro ilia gastamo.

Inter la fratulinoj kaj en la domo oni sentis specialan spiriton de amo kaj komuneco. Pri tio la fratulino Imakulata, ofta gastino en Pale atestas: "En la kolektivo estis kvin fratulinoj. Oni povas diri ke tio estis kolektivo de kvin anĝeloj. En la kolektivo regis spirito de preĝo, oferemo kaj amo." Kaj la fratulino Fabijana Ŝimiĉ asertas: "Ili estis veraj monaĥinoj. Ili plenumis ĉion kio estis ordonita kaj kion ili povis fari. Mi dezirus ke ni havu multajn tiaspecajn fratulinojn."

MARIA-DOMO EN PALE

Komence de la Dua mondmilito, en la jaro 1941 la fratulinoj Jula, Berchmana, Krizina, Antonija kaj Bernadeta vivis en Pale apud Sarajevo, en la monaĥinejo nomata Maria-domo. Tiu monaĥinejo estis fondita en 1911 por esti ripozejo kaj konvaleskejo por la malsanaj fratulinoj el la Instituto de sankta Jozefo el Sarajevo kaj por aliaj gastoj. Du jarojn pli poste, apud la monaĥinejo estis konstruita kaj fondita elementa lernejo kiu funkciis ĝis 1919, kiam la registaro de la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj ĝin nuligis kaj malfermis la Serban popolan lernejon. Post la fermo de la lernejo la fratulinoj sin dediĉis al la origina apostoleco: ili akceptadis ĉiujn kiuj bezonis ripozon aŭ ian ajn helpon - malriĉulojn, forpelitojn kaj rifuĝintojn. Kelkfoje dum la somero estis gastigitaj kaj nutritaj eĉ pli ol sesdek personoj tage. Ekde 1927 la fratulinoj en la Serba popola lernejo en Pale instruis katekismen al la katolikaj infanoj. Katekismen instruis la fratulino Berchmana.

Ekde la jaro 1932 la estrino de la monaĥinejo estis fratulino Jula. Sub ŝia gvidado estis daŭrigitaj la ekumena, pastoralaj kaj karitaj agadoj ĝis la 11-a de decembro 1941, kiam ĉiuj kvin fratulinoj estis perforte forkondukitaj kaj mortigitaj.

Fratulino Ljiljana, la nevino de la fratulino Jula, ofte dum la knabinaĝo restadis en Pale. Ŝi memoras la oferemon de la fratulinoj Krizina kaj Antonija en la ĝardeno, en la stalo kaj en la lavejo, la senlacemon de la fratulino Bernardeta en la kuirejo, la paciencon de la fratulino Berchmana dum ŝia maljunaĝo kaj la ĉiuflankecon de la fratulino Jula kiu estris ĉiujn agadojn en la domo kaj mem faris ĉiujn ajn laboron se necesis.

En oktobro 1941 la fratulinoj akceptis en sian domon la slovenan pastron Franc Ksaver Meško, kiun la gestapanoj, kune kun la aliaj tricent pastroj forpelis el Slovenio. Ekde tiam ĉiutage en la monaĥineja kapeleto estis servata meso, kio estis fonto de konsolo por la fratulinoj ĝis la tago kiam ili estis forkondukitaj al malliberigo.

Franjo Milišić, la monaĥineja helpanto, rakontas ke la fratulinoj bredis brutaron kaj kortbirdojn kaj plenumis ĉiun mastruman laboron. Per estimo ili rilatis al li kaj ankaŭ al la laboristo, ortodoksulo, kiu de

Fratulino M. Berchmana Leidenix

Karolina Anna f. Berchmana Leidenix naskiĝis la 28-an de novembro 1865 en Enzersdorf ĉe la rivero Fisch, nemalproksime de Vieno en Aŭstrio, de la patro Michael kaj la patrino Jozefa, naskita Benkhofer.

Ŝi estis baptita post du tagoj en la paroĥa preĝejo de sta Tomaso apostolo. En la familio Leidenix naskiĝis ankoraŭ unu knabino Mathilda (pli poste f. Bernarda), la tria naskiĝis morta.

La familio restis frue sen la patro, pro tio la patrino Jozefa, kun siaj du filinoj, troviĝis en tre grava materia problemo. La fondintino de la nove fondita Kongregacio de la Filinoj de la Dia amo en Vieno (1868) la Patrino Franziska Lechner akceptis en la jaro 1878 ambaŭ knabinojn en la internulejon, kaj la partan ekonomian subtenon donis la regiona tribunalo el Schwechat. Karolina tiam estis dekdujara. Dum la edukado en ŝi ekĝermis la emo al la spirita servo kaj ŝi decidis iĝi membrino de tiu monaĥina Kongregacio.

En la jaro 1882 ŝi noviciĝis kaj ricevis la nomon Maria Berchmana Johanna. La unuajn votojn ŝi faris la 20-an de aŭgusto 1883 kaj la vivovotojn la 17-an de aŭgusto 1892. Tuj post la unuaj votoj ŝi estis sendita al Bosnio, tiam misiista lando, kie ŝi restis ĝis la fino de sia vivo. Ŝi agadis en la lernejoj de la Kongregacio kiel tre lerta kaj engaĝita instruistino, kaj pli poste ŝi instruis private talentajn katolikajn, ortodoksajn, muzulmanajn kaj judajn infanojn. Krom aliaj laboroj, al la infanoj ŝi ankaŭ instruis katekismen.

Dum la unua mondmilito en la germana milithospitalo en Višegrad ŝi flegis gravajn malsanulojn kaj vunditojn. La estro de la hospitalo persone dankas al la fratulino kaj, interalie, en la letero el la jaro 1915 oni substrekas: "...kiu vidis nian hospitalon, tiu foriris plena de dankemo kaj



laŭdo. Ĉe tio vi, estimata fratulino Berchmana, havas grandan kontribuon. Ĉar la militkomando nuligis la fratulinajn servojn, mi dankas al vi, nome de la hospitalo kaj de la malsanuloj pro via ĝisnuna sindona kristana kaj samaritana agado."

En la jaro 1931 kiam ŝi estis pli ol sesdekjara, ŝi estis nomumita instruistino por novicinoj en Sarajevo. Dum ŝia edukista laboro ŝi klopodis en la korojn de la junaj fratulinoj enigi la amon al la Dio, la Eklezio kaj al la proksimulo, pri kio atestas la edukitaj novicinoj. La fratulino Beata konsideras ŝin sankta virino kaj vera patrino: "Ŝi estis treege sankta kaj pia animo, Dioplana. Al ni ĉiuj ŝi estis vera patrino. Ŝi luktis por ni kvazaŭ leonino." La fratulino Imakulata vidis en ŝi "la monaĥinon laŭ la koro de Jesuo", idealan monaĥinon, vivan ekzemplon por ni, tiam, junaj fratulinoj. Ŝi deklaras: "Ŝi estis mia instruistino en la novicinejo en Sarajevo... brila ekzemplo pri preĝoj kaj oferado. Grandanima kaj nobla. Mi sentis ke ŝi posedas grandan amon al Dio, al la Kongregacio kaj al la proksimuloj."

La fratulino Berchmana estis virino profunde religia. Ofte ŝi restadis en la kapeleto tute alorbita de la preĝo. Videblis, asertas la fratulino Ljudevita, ke ŝi posedis veran kredon kaj grandan amon al sia fianĉo Jesuo. Krome, ŝi atestas: "Ŝi uzis ĉiujn siajn fortojn por nin bone prepari por la estonta monaĥina vivo kaj nin ĉiam pli proksimigi al la bona Dio."

Ĉiuj fratulinoj akcentis ke ŝi estis saĝa kaj tre inteligenta, sed modesta kaj humila. Ŝi havis multajn okazojn por ekzercado kaj prospero per tiuj kvalitoj, precipe koncerne la kroatan lingvon kiu ne estis ŝia gepatra lingvo. Pri tio skribas la fratulino Ljudevita: "Ĉar ŝi ne regis bone la kroatan lingvon, plurfoje okazis ke ŝi esprimis ion malĝuste, kaj ni - kiel junularo - kutimis eĉ laŭte ekridi. Kaj kiam ŝi eksciis pro kio ni ridas, ŝi ne ofendiĝis, sed tion ŝi akceptis trankvile kaj humile."

Ŝi kutimis ekregi ĉion, memoris la fratulino Inviolata Jakov, sen esprimi siajn apartajn dezirojn kaj bezonojn. Kvankam ŝi suferis je astmo, ŝi ĉion eltenis pacience kaj sindone al la Dia volo. La fratulino Ilijana Iviĉ memoras ke pro "iaj aferoj ŝi multe suferis, sed ĉion ŝi silente toleris".

Ŝi aparte distingigis per siaj decidemo, precizeco, justo kaj memdisciplino, kion ŝi postulis ankaŭ de la junaj fratulinoj. Pri tio la

fratulino Apolonija Peĉnik raportas: "Ŝi estis bona, sed severa, tre akurata kaj ŝi postulis ke ankaŭ ni estu tiaj." En la "Nekrologoj de la fratulinoj" de la Filinoj de la Dia amo estis pri ŝi notite: "Laŭ la naturo ŝi estis tre severa, sed ŝi havis grandan deziron al la junaj fratulinoj, novicinoj, enverŝi la ĝustan spiriton por fariĝi bonaj monaĥinoj."

Pri la fratulino Berchmana oni povas diri ke ŝi estis vera ekumena kaj misiista persono. Dum ŝia restado en Breŝke nemalproksime de Tuzla ŝi instruis al la muzulmanaj infanoj legi kaj skribi kaj ŝi estis nomita "fratulino turka". Kiel tia ŝi estis konata ankaŭ en Pale, kiel ŝi venis - al duan fojon - en septembro 1939 en la aĝo de sepdek kvar jaroj. La saman jaron "La katolika semajngazeto" raportas: "Ankaŭ la fratulino Berchmana estas en Pale. Tio estas la unua el la fratulinoj, kiu venis al Bosnio. Ŝi faris multon bonan en la lernejo, en la novicinejo kaj ekster la domo. Karese oni ŝin nomas 'fratulino turka'. Ŝi faris bonon al la infanoj kaj ankaŭ al la ortodoksaj loĝantoj en Pale kaj ŝi estis nomata ankaŭ 'la serba patrino.'"

Du monatojn antaŭ sia morto, dum la interparolo kun la pastro Ksaver Meŝko, la fratulino Berchmana jene resumas sian tutan vivon: "Mi dankas al Dio pro du aferoj: ke mi naskiĝis kaj estis edukita kiel katoliko kaj ke mi fariĝis monaĥino." Tiam ŝi ankoraŭ ne konjektis ke ĝuste pro tiuj du kvalitoj - la religio kaj la monaĥina servo - ŝi suferos la martiran morton.

Ŝi estis mortigita la 23-an de decembro 1941 en la arbaro ĉe Sjetline, kiam ŝi estis 76-jara.